



HEROLDO DE UTENA

Informilo de BET- 49, 08-07-2013, lundo N-ro 3



GRATULO

De la Prezidanto de la SEJMO de Litova Respubliko

Mi gratulas Litovan Esperanto-Asocion, ĉiujn amantojn kaj flegantojn de ĉi-tiu lingvo okaze de la 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Pri senduba aktualeco de la aranĝo evidente parolas ne nur gravaj atingoj de la jaro, sed ankaŭ la fakto, ke en ĝi partoprenas gvidantoj kaj reprezentantoj de Eŭropaj Esperanto-organizaĵoj.

Mi bondeziras ankaŭ en la estonteco disvolvi kulturan kunlaboron inter landoj de Baltia regiono, stimuli pluan integriĝon de Litovio, Latvio kaj Estonio en komunan kulturan spacon de Eŭropo, aktivigi senperajn kontaktojn inter loĝantoj de tiu regiono.

Mi ĝojas, ke dum lastaj jaroj agado de Litova Esperanto-Asocio pli aktiviĝas. Plivastiĝis instruado de Esperanto, reviviĝis eldona agado, pli da atento estas dediĉata al informado de la socio pri esenco kaj celoj de Esperanto-movado.

Mi bondeziras konservi kaj eĉ pligrandigi la rapidecon, popularigi la internacian lingvon Esperanto en Litovio kaj ekster ĝiaj limoj, ankaŭ disvastigi informojn pri nia ŝtato inter eksterlandaj esperantistoj.

Prezidanto de la SEJMO
Vydas GEDVILAS

LA PROGRAMO por la 9a de julio (mardo)

- 8.00–9.00 Matenmanĝo
- 9.00–10.00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
- 10.00–11.00 Somera universitato
- Petras Čeliaskas: “Vojo de Litovio al kristanismo” (aŭd. n-ro 2-08)

- 11.00–12.00 Somera universitato
Aleksander Korĵenkov prelego el la ciklo “Historio de Esperanto” (aŭd. n-ro 2-16)
- 12.00–13.00 Somera universitato
Stano Marček „Sonlibroj en Esperanto“ (aŭd. n-ro 2-08)
- 13.00–14.00 Tagmanĝo
- 14.00–15.00 Somera universitato.
Ed Robertson ”Kion signifas pralingvo” (aŭd. n-ro 2-16)
- 14.00–15.00 Lingva konsultado de litovaj esperantistoj. P. Čeliaskas (aŭd. n-ro 2-08)
- 15.00–16.00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
- 15.00–16.00 Originala priesperanta kvizo. Gvidas Mikaelo Bronŝtejn (aŭd. n-ro 2-16)
- 16.00–17.00 Somera universitato
Dima Ŝevĉenko, Mikaelo Bronŝtejn kaj Anna Striganova “Eldonejo *IMPETO* – 20 jaroj” (aŭd. n-ro 2-08)
- 17.00-18.00 Prelego de Gražina Opulskienė “Pulgis Andriušis (1907-1970) – fama utenano, tradukisto, ĵurnalista, esperantisto” (aŭd. n-ro 2-16)
- 20.00–21.00 Koncerto-diskoteko kun la ensemblo *Indraja* (Kultura centro de Utena, str. Aušros 49)



Stano Marček

prezentos tri lingvoinstruajn kaj unu prifungan prelegojn

Slovaka esperantisto ĵurnalisto Stano Marček estas redaktoro de la revuo Esperanto. Pasinte li estis teknikisto, manaĝero de fama slovakaj rokmuŝika grupo Team' (kiu kantis kaj koncertis ankaŭ en Esperanto). Li laboris kiel direktoro en loka kurtonda radio kaj kiel direktoro de komerca firmao. Nuntempe li posedas propran komercan firmaon kaj eldonejon. En sia junaĝo li aktivis en slovakia E-movado, gvidis multajn kursojn de Esperanto. Laste li nove elstaris en la instrua kampo. Li ellaboris sukcesan kernolibron *Esperanto per rekta metodo*. La ilustrita 22-leciona kurso, estas jam tradukita al pli ol 30 lingvoj. Inkluzive la lingvojn litova kaj vjetnama.

Kiel funkcias la kurso de Stano Marček praktike elprovas tiuj, kiuj vizitos liajn lecionojn de en BET-49. Temos ankaŭ pri praktikaj rekomendoj por lernantoj kaj instruantoj.

En la somera universitato oni aŭdos pri teorio de Rektmetoda instruado de Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu temas pri la metodo, per kiu nia patrino instruis al ni nian gepatran? Kiu sen tradukado kaj troa gramatiko instruis al ni rekte pensi en nia lingvo?

Lernantoj en niaj E-kursoj ofte laciĝas post kelkhora laboro. Nia gasto Stano Marček instruos al vi, kun gitaro, kelkajn Esperanto-kantojn, konvenajn por niaj kursoj, kaj montros al vi, kiel vigligi per kantado la instruadon.

Alia aktuala temo - Sonlibroj en Esperanto. Sonlibroj (laŭtaj libroj, aŭdlibroj) lastatempe tre populariĝis en la mondo. Emfazinda estas la pedagogia valoro: aŭskulti kaj kompreni parolatan tekston, lerni novajn vortojn, alpoprigi al si belajn kaj modelajn vortturnojn en agrabla mondo de fabeloj, romanoj aŭ poezio.



En registrejo. Knabinoj el E-klubo "Juneco" pacience atendas la fluson de la aliĝintoj. De maldekstre Inesa Balaikienė, Olga Srojeva, Jolita Ružauskienė, Jolanta Dudėnaite

Mikaelo Bronštejn (pseudonome: Brunŝtono) aktiva movadano, kanzonisto, verkisto, tradukisto

Kiam vi plonĝis la muzikan mondon?

Mi komencis kanti, kiel diris mia patrino, jam dujara, sed muzikan klarecon ne akiris. Estis ja postmilita tempo, mankis mono por aĉeti muzikilojn kaj pripagi lernadon en muzika lernejo. Jam en juneco, kiam mi ekverkis poemojn, mi certiĝis ke tiujn oni pli akceptas kiam mi ilin kantas. Kiam mi jam estis studento, mi komencis po iom gitarludi.

Dekomence vi kantis en la rusa, ĉu?

En la 2-a jaraĝo mi kantis en tri lingvoj: en la rusa, en la jida kaj en la ukraina. Ĉar ĉiuj tri estis miaj hejmaj lingvoj. Kanti en Esperanto mi komencis kun fremda gitaro. Okazis tio en Litovio! Estis la jaro 1967. Mi kantis mian la unuan kanton en BET-9 aŭ SEJT-9 en Kaltanėnai. Min akompanis Ljonia Borisov. Estis iom naiva kanto, kies vortojn mi nekonservis. Poste mi komencis verki proprajn kantojn, traduki ĉefe bardajn kantojn. Tion al mi sufloris Jefim Zajdman, kiu anoncis la tutlandan konkurson por traduki en Esperanton kvar rusaj kantoj. Unu el tiuj kantoj tradukis mi kaj ĝi estas kantata ĝis nun. Estas la kanto de Matvejeva „Kiom longa, longa vojo“.

Ĉu la influon pri gitarludado al vi faris iuj esperantistoj?

Pri gitarludado la influon faris ne esperantistoj, sed rusaj bardoj, kiel Bulat Okuĝava, Vladimir Visockij kaj Evgenij Klaĉkin. Ili estis ekzemploj por mi. Sed se temas pri esperantistoj la maljunuloj kiel mi bone memoras ke en la postmilita junulara Esperantomovado ni havis nur unusolan gitariston, kiu estis Ljonia Borisov. Li estis Esperanto-ekzemplo por mi.

Vi ofte partoprenas diversajn Esperanto-aranĝojn kun viaj kantoj. Kiu el viaj partoprenoj estis speciale impresa por vi?

Tre impresa, verŝajne, estis mia la unua apero sur la internacia scenejo antaŭ la publiko en Vieno 1992. Tie mi havis solkoncerton. Mi tre timis kaj por kuraĝiĝi antaŭtrinkis 150 gramojn da konjako. Mi kantis kaj poste venis homoj kun floroj por gratuli min! Unu aŭstralia avino, kiu posedis bonanflarkapablon donis al mi tablojdon por elimini la buŝodoron ...

Partoprenantoj de BET kun plezuro aŭskultos vin ĉi tie. Kie vi koncertos krom BET?

Ĉi jare mi havis elĉerpigan turneon en Francio. Tie mi vizitis 18 urbojn kaj kantis ankaŭ por neesperantistoj. Post BET mi planas veni Francion ankoraŭ por du esperantistaj renkontiĝoj.

Aŭdi Esperanton en la reto

Foje nekonata Azia komencanto en Vikipedio demandis min, kie li povus aŭdi vortojn kaj frazojn en Esperanto, por ekzerci sian aŭdkomprenon kaj plibonigi sian elparolon. Ĉi tiu artikolo estas traduko de mia respondo.

[Forvo](#) enhavas [kolekton](#) de 7121 sonregistraĵoj de Esperantaj vokabloj, de diversa kvalito, kun indiko pri sekso kaj lando de la parolanto.

Esperanto furoras en la multlingva frazaro [Tatoeba](#), en kiu krom 239 mil Esperantaj frazoj troveblas ankaŭ 548 [sonregistraĵoj](#). Atentinda estas ankaŭ la kategorio “[Esperanto-elparolo](#)” en la Vikimedia Komunejo (111 dosieroj) kaj iom pli en la superkategorio “[Esperanto-sono](#)”.

Ĉi tiujn sonojn registris volontuloj kaj ĉiuj reuzeblas laŭ libera permesilo Krea Komunaĵo: Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe (Forvo), Atribuite (Tatoeba) kaj Atribuite-Samkondiĉe aŭ pli libera (Vikimedia Komunejo). Legu pli pri “Krea Komunaĵo” en Vikipedio.

Laŭ informo de E@I, uzantoj de la plej granda Esperanto-vortaro [PIV](#), konsultebla post senpaga regis-

triĝo, baldaŭ povos aŭskulti ĉiun el la preskaŭ 50 mil leksikaj unuoj. Pri ilia voĉregistrado nun diligente laboras unu voĉo en la E@I-oficejo. Ankaŭ [lernu!](#), la plej populara retejo por lerni Esperanton, proponas laŭtleĝaĵojn de kelkaj el siaj kursoj (menuo: Lernado – Elŝutaĵoj – MP3) kaj aldone ĝi baldaŭ tute renoviĝos.

Kompreneble, la plej bona alternativo tamen restas aŭdi Esperanton parolata vive, pro kio rekomendindas partopreno en Esperanto-renkontiĝo (ekzemple en BET – red.)

Por rapide ekhavi ideon pri la sono de Esperanto, ĉiumomente aŭskulteblas [Muzaiko](#). Ekzerci aŭdkomprenon helpas [Facila Vento](#), en kies kategorio Radio troviĝas laŭlegitaj tekstoj. Ĝia subpaĝo Paroli enhavas liston de nomoj kaj horoj de volontuloj, kiuj volas paroli al komencantoj. Ĉiutage unu vorton, akompanatan de ekzempla frazo, elparolo kaj angla traduko publikigas la blogo [Transparent Language](#).

Marek Blahuš (El *La Ondo de Esperanto*)

Pri La Ondo de Esperanto – subtenanto de BET

La sendependa internacia ĉiumonata magazino Ondo de Esperanto aperas en najbara al Litovio teritorio, en la distrikta centro Kaliningrad. Sube ni prezentas kelkajn ĝiajn datenojn:

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki, Marian Zdankowski

Elektronika adreso: sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo: Esperanto.Org/Ondo

Adreso: RU-236039 Kaliningrado, ab. ja. 1205, Ruslando

Abontarifo por 2013:

— Internacia tarifo: 38 eŭroj

— Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

— Ruslanda tarifo: 590 ruslandaj rubloj

— Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

— Elektronika abono: 12 eŭroj

Konto ĉe UEA: avko-u

Eldonkvanto: 600 ekzempleroj

HEROLDO DE UTENA

**estas via gazeto,
via tribuno:
uzu la okazon paroli!**

PAPO RATZINGER SCIAS PRI ESPERANTO

Okaze de la 75-jariĝo de Radio Vatikana (fondita en 1931 de Pio la 11a) Papo, Ratzinger li vizitis la 3an de marto 2006 la domon, en kiu estas la redakcioj kaj produktada centro de la elsendoj. Dum la vizito la Papo ankaŭ trairis ĉiujn etaĝojn de la palaco, por viziti la diversajn redakciajn ĉambrojn.

La redaktoroj estis grupigitaj laŭ lingvaj grupoj. La redaktoro de la elsendo en Esperanto atendis la Papon kun la kolegoj de la armena, latva kaj litova sekcioj.

Akompanis la Papon pastro Federico Lombardi, ĝenerala direktoro de la Radio (hodiaŭ ankaŭ direktoro de la gazetara salono de la Sankta Seĝo). Unue li prezentis al la Papo la diversajn redakcianojn. Jen la transskribo de la interparolo pri Esperanto:

Pastro Lombardi: «Ĉi tie estas armenoj, litovoj, latvoj kaj ankaŭ Esperanto».

La Papo: «Ankaŭ Esperanto! Mi havas bone ĉeestantan en mia menso Esperanton».

Pastro Lombardi: «Ni havas la asocion de la katolikaj esperantistoj, kiuj pretigas la programon en Esperanto...».

La Papo: «Ĉu estas personoj, kiuj aŭskultas la programon?».

Pastro Lombardi: «Jes, jes, ĉefe en centra kaj norda Eŭropo. Kaj nekatolikaj...».

La Papo: «Ĉu eĉ nekatolikaj?».

Pastro Lombardi: «Jes, jes, ĝi estas ekumena servo...».

(“Espero katolika” la revuo plej malnova el ekzistantaj nun)

P.S. En la Utena-urba preĝejo de Kristoflugo en la Ĉielon hieraŭ vespere okazis meso en la internacia lingvo Esperanto. Bona novaĵ por “Espero kato-lika”!



Utena. Preĝejo de Kristoflugo en la Ĉielon

KIO ESTAS MONATO?

Monato estas internacia Esperantlingva magazino sendependa kun artikoloj pri politiko, kulturo, scienco, moderna vivo kaj aliaj temoj. Ĝi estas presata en Belgio, kaj havas legantojn en 65 landoj.

Monato estas unika - en neniuj landoj kaj lingvoj de la mondo ekzistas simila revuo, en kiu pri Afriko verkas afrikano, pri Brazilo verkas brazilano, pri Japanio japano, pri Litovio litovo. Tio estas unu el la grandaj atingoj de la Esperanto-movado, kiu taksas ĉiujn homojn egalaj.

Monato estis fondita en 1979 de Stefan Maul. La unua numero aperis la 15-an de januaro 1980, kaj ekde tiam aperas mezume unu numero ĉiumonate. *Monato* estas la posteulo de *Semajno*, de kiu aperis nur unu numero, tiu de la 1-a de septembro 1978. Ekzistas entute 8



Kolegio de Utena, kie okazas ĉefaj aranĝoj de BET-49

diversaj versioj de *Monato*. La plej populara kaj unua estas la magazina aŭ „papera“ versio. Ekde 2001 abonantoj povas ricevi ĉiujn tekstojn de *Monato* per retpoŝto, ĉu en askia formo laŭ la x-surogato, ĉu en XHTML-formo en Unikodo.

Ŝerce kaj ironie

Balota fenomeno (laŭ Juozas Erlickas)

Antaŭ balotado litovo tre stultiĝas. Eksterlandano tion malfacile povas konjekti. Ja litovon ĝenerale (eĉ antaŭ la balotado) li ne traktas tro saĝa. Tia eksterlandana opinio ne estas motivita. En normalaj kondiĉoj litovo povas esti ruza, lerta, inĝenia. Ho ve, dum la balota periodo ĉi tiuj kapabloj ien malaperas. Ni balotas por la plej bonaj, sed elektas la plej malbonajn. Tiel ripetiĝas de jaro al jaro. Tion ne eblas ellerni, tion ne eblas fari speciale. Litovo ne estas akuzebla ...

Gastado laŭ naciaj kutimoj

Kun kiu venas por gastado kaj revenas el gastado reprezentantoj de diversaj popoloj?

La franco venas kun amorantino. La anglo – kun anekdoto. La ruso – kun botelo. La judo - kun duonfrato.

Revenas la franco kun nova amorantino. La anglo – kun nova anekdoto. La ruso – kun bluaĵo sub okulo. Judo kun torto peco por onklino. Kaj kiel kondutas sin litovoj dum sia gastado? Rememoru!

Maljuna profesoro rakontas al siaj kolegoj:

– Antaŭ nelonge mi sonĝis, ke mi prelegas al Studentoj. Mi vekigis, kaj kiel vi opinias? Mi prelegas fakte!

Zamenhof:

Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro.
Famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas.
Pano buŝon ne serĉas.

Vetera prognozo

Por la 9-a de julio (mardo)
Serenaj senpluvaj mateno, tago, vespero.
Temperaturo tage + 23-26°C

Verku kaj fotu por *HdeU!*
Redaktoro
Vytautas Šilas,
+370 611 75500
vilnastelo@yahoo.lt